# L'ALVOKO

NUMERO 6-

25-an de Novembro 1962.

## BONVENIGA SALUTO DE LA PREZIDANTINO

Koran bonvenon al la impona grupo de estontaj samideanoj, kiuj jus decidis kuniĝi kun ni Esperantujo.

Mi estas monvinkita, ke la novaj studantoj tiom ĝuos la lernadon de nia lingvo, kiom ni mem ĝuis nian eniron en la movadon.

Al la fideluloj de la unua horo, mi etendas la manon kaj petas de ili dauran apogon.

Sinjoroj Beaupré kaj Campbell meritas nian dankenon pro ilia subteno ĉeestante niajn kunvenojn.

Dankon al S-ro Melanson, kiu bonvole fariĝis kursgvianto por la novuloj. Li jam akiris la konfidon de siaj lernantoj.

Dankon tute specialan al s-ro Gaucher, kies lingvoscio nepre kontribuos gvidi nin ĝis perfekta esperantismo.

S-ino Yvette Doré.

## SCHWEITZER

(De: Eugene Melanson)

Nian historieton pri la vivo de Schweitzer mi daŭrigas jen la tria parto en la nuna tempo.

### TRIA CAPITRO

Schweitzer havas tridek jarojn. Jam li estas fama viro en Eŭropo. Filozofoj, trologoj kaj muzikinstruistoj legas liajn librojn kaj parolas pri li. Li faras plurajn lekciojn en multe da germanaj urboj. En Francujo kaj en Hispanujo, li donas orgenkoncertojn. Jam li estas mondfama. En Strasburgo, pentristino skigas lian portreton. Schweitzer sidas trankvila en seĝo dum la pentristino malrapide laboras pri lia portreto. Ĝi estas la portreto de granda kaj sana viro, kun longaj, nigraj haroj kaj dikaj lipharoj. Ĝi estas bona portreto sed ĝi ne montras tion, kion Schweitzer pensas dum ĉi-tiu momento.

La pentristino ne konas liajn pensojn. Ŝi nur scias, ke Schweitzer estas tridekjara. Ŝi scias nenion pri lia celo oferi sian vivon al la servado de la malfeliĉa homaro.

Li pensas pri siaj predikoj. Li ofte kaj multe parolas en la preĝejo pri la vivo de Jezuo. La predikoj estas bonaj sed ili ne sufiĉas. Li ne plu volas nur paroli pri la amo sed li volas ankaŭ agi.

La Konga misio bezonas homojn, ĝi bezonas lin. Kion fari? Ĉu li devas forlasi sian karieron, kiel instruisto kaj artisto en Europo? Jes, tion li devas fari. Li devas aliri Afrikon kaj helpi la suferantojn indiĝenajn. Lia decido malfaciliĝas.

En Oktobro de 1905, li skribas leterojn al siaj gepatroj, parencoj kaj amikoj. Li diras al ili, ke li devas lerni medicinon. Liaj gepatroj, parencoj kaj amikoj fariĝas mutaj antaŭ lia decido. Ili ne povas kom-preni lin. Kial tia homo povas flankenĵeti tiel belan kaj prosperan vivon kiel la sian.

Kial li volas komenci la malfacilan studadon pri medicino kaj poste labori en malsana afrika klimato? La decido forlasi Eŭropon ŝajnas sufiĉe malbona en si mem, sed la penso foriri al Afriko estas tute nekomprenebla por siaj amikoj. Schweitzer estas teologisto, ili pensas; do, estas pli facile kaj simple iri ĝis Afriko, kiel misiisto.

En Decembro 1911, li doktoriĝas kiel kuracisto kaj geedziĝas kun Hélène Breslan, filinon de Strasburga historiisto. Dum la lasta monato, li kaj lia edzino loĝas ĉe siaj gepatroj en Gunsbach. Nun li pretiĝas ĉion por sia granda vojaĝo al Afriko. Estas memvida por li, ke inaŭguro de malsanejo multe kostas. Li gajnas multan monon pro siaj libroj kaj siaj orgenkoncertoj; li ankaŭ vizitas amikojn de kiuj li petas almozon por sia celo. Li ricevas helpon de francaj, germanaj, svisaj kaj diverslandaj amikoj. Li aĉetas drogojn, medikamentojn kaj ĉion, kion bezonas malsanejo. En Parizo li pristudas tropikan medicinon kaj lia edzino fariĝas flegistino por helpi lin en lia nova laboro en tropika lando. En la sekvantaj jaroj, Hélène fariĝas serioza kaj altvalora helpistino.

(Daurigota)

## SINGAPURO

De: S-ino L. Hardouin

Je sepdek-sep mejloj de la ekvatoro, la insulo Singapuro situas sude de Malezujo, kaj komunikas kun la firma tero per la mal-larĝa markolo Jokore. Singapuro havas sian propran kulturon kaj oni konas tiun landon pro ĝiaj buntaj orkideoj kaj ĝia tropika fauno; oni konas ankau ĝiajn sovaĝajn bestojn. Du milionoj da enloĝantoj, plej-parte cinoj, vivas en tiu insulo, kies vetro estas tre varma (90-100oF).

En "Haw Par Villa", ni vizitas la Ĝardenojn kaj la strangegan kolekton de ĉinaj statuoj. Ili reprezentas scenojn de la ĉina mitologio kaj interpretadas malnovajn proverbojn. Ni ankau vizitas la restadejon de "Aw Boon Haw" kaj ĝian admirindan kolekton jadan. Ni vidas la bud-distan templon de la "mil Lumoj".

Vespere, ni ĉeestas ĉinan operajon kaj malajajn dancojn. La dancantoj surportas belaspektajn kaj multkostajn kostumojn. Poste, ni ĉirkauiras la insulon en ŝipeto kaj vidas vilaĝojn konstruitajn super la maro kaj strantajn sur fostoj. Singapuro estas la kvina haveno en la mondo lau negoco.

Visitante kauĉukofarmon, oni lernas, ke la arboj ne povas esti trnaĉitaj antau kvar jaroj kaj ĉiu arbo produktas por kvindek galonoj ĉiujare dum dudek jaroj. Tiaj kauĉukajoj tre interesas la turistojn.

Post Singapuro, ni alvenas Johore'on. En ĝia ĉefurbo, ni vizitas la Sultanan Palacon, la Moskeon, iun orkideofarmon, iun botani-kan ĝardenon kaj tiun parkon, kie malgrandaj simioj sekvas kaj surgrimpas nin por have frutrajon. Alia interesa vidindajo estas la spektaklojn de la serpentĉarmistoj. Tie, la monunuo estas la malaja dolaro.

Ni daurigas nian vojaĝon ĝis Ŝajgono, la plej alloga urbo en Oriento. Tie, troviĝas franca kaj orienta kulturo; oni nomas Sajgonon: "La Perlo de L'Ekstremoriento". En Vjetnamo ankau staras antikvaj temploj, pagodoj, botanikan ĝardenon, ktp.ktp. La vjetnama virino sin vestas tiel ŝike kaj gracie, ke ĉiam oni povas distingi ŝin inter aliaj nacioj. Kvankam multajn belajn kvartalojn havas Sajgono, ankau troviĝas multe de sampoj kaj jonkoj sur la rivero Mekong. Tie, la monunuo estas la "dong" kaj la vetero tropika. Parenteze, la francan lingvon oni sufiĉe none parolas en tiu parto de la mondo.

(Daurigota)

## IOMETE PRI CIO

Le sezono arta kaj literatura komenciĝis en Kebeko ĉi-semajne per la prezento de Profesoro Jacques Vier, beletristo de la franca uni-versitato de Rennes. Dank al sunvencio de la Kanada Konsilo pri Artoj, li fariĝis invitita prelegisto ĉe la Universitato Laval en Kebeko. Li oportune traktis pri humure kaj ironio en la nuntempa franca teatrarto.

"El Cid" historia filmo preskaŭ perfekta; ĉu kulturo au distriĝo en fotelo.

"Richatd II" de Shapeskeare, prezentita de la trupo "Theatre du Nouveau Monde" por kiu ŝatas grandajn teatrajn efektojn, restas bona teatra vespero.


"Popov" kaj la famekonata "Cirko el Moskvo", kies reputacion oni pufreklamis per televida prezento de filmo, allogas la Kebekanojn kaj cedas nur al "Salon de la Femme" (mi estis aldononta: "kaj de la Beleco") prezentita ĉe "Québec Winter Club". Tiu evento sopirigas pro envio la sinjorinojn, sed malesperigas la sinjorojn, kiuj konsoliĝas vizitante la multnombrajn "Salon de l'Automobile".

Tiuokaze ili mallonge pripensas la oportunon interŝanĝi tiun malmodernan auton de la jaro 1960 au 61 por tute nova kaj sendube plej bona ĝis aperos la venontjara modelo.

S-ino Cecile Lachance.

LA DUONA KONCERTO.

-Kiel vi fartas, amiketo? Kie vi estis hieraŭ vespere?
-En la koncerthalo.
-Ĉu vi bone amuziĝis?
-Jes, la koncerto estis bona. Sed bedaŭrinde .....
-Ho, ĉu okazis akcidento?
-Ne, ne. Bedaŭrinde mi nur aŭdis la duonan koncerton.
-Pro kio? Ĉu vi forlasis la koncertejon antaŭ la fino de la koncerto?
-Ne, mi restis ĝis la fino.
-Kial do vi aŭdis nur la duonon?
- Ek de antaŭhieraŭ mi aŭdas nenion per la maldekstra orelo.




# KRUCVORTENIGMO

DE: S-ro Vincent Beaupré

## Horizontale

1 - Nomo de Tiu ĉi problemo (Pl. Ak)
2 - Artikolo - Verbfino
3 - Prefikso - Desegni sur mapo - En kato
4 - Tedita (apos) En Afekto - Konjunkcio
5 - Rapide malleviĝi - Ralph Iron - Parto de vizaĝo
6 - Franklin Delano Roosevelt Aĵo (Apost) En Aroganta
7 - Du similaj vokaloj - Prepari negoceblan valorpaperon (inv) - Preposicio
8 - Sara Bernhardt - En levo
9 - Kiu Skribas sian Biografion




## Vertikale

1 - Kunigata
3 - Individuo - Sufikso
4 - Christian Anderson
5 - Malstreĉi
6 - Atingi militan gradon
8 - En mano - Urbo de Canaan
9 - Antonio Fogazzaro - Ferdinand de Lesseps
10 - Malsaviĝi
11 - Produktiĝi (inv)
13 - Posesiva adjektivo - Adverbo
14 - Verbofino - Konjunkcio - Konjunkcio (inverse)
15 - Deklinacio
16 - Azoto

## SOLVO DE LA ANTAUA PROBLEMO

| | 1 | 2 | 3 | 4 | 5 | 6 | 7 | 8 | 9 | 10 | 11 | 12 |
|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|
| 1 | K | L | A | K | I | | | F | L | A | T | I |
| 2 | L | A | M | O | | O | K | | E | N | I | R |
| 3 | A | G | I | | A | K | S | O | | A | R | I |
| 4 | R | E | | | N | A | A | N | | | O | Ŝ |
| 5 | A | | F | R | A | N | Ĝ | I | L | O | | O |
| 6 | | L | A | I | T | | | B | A | L | O | |
| 7 | | A | Ū | T | O | | | A | K | S | O | |
| 8 | Ĉ | | K | O | M | P | E | N | S | I | | M |
| 9 | A | B | | | I | A | M | A | | | L | A |
| 10 | R | I | G | | O | L | A | S | | S | O | N |
| 11 | M | E | N | D | | A | J | | J | U | Ĝ | I |
| 12 | U | N | I | K | A | | | A | G | R | I | K |